

Tamen Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO JUNIO 2009, JARKOLEKTO 27
Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019

esperantobob@iprimus.com.au

Legeblas ankaŭ surrete: www.gazetejo.org

”Kial la knabo kunportis ŝtuparon al sia lernejo?”

”Ĉar lia estas altlernejo!”

Afta epizootio

(lingva buŝ-kaj hufmalsano)

Estas, en la plej nova eldono de la lingvoĵurnalo ”Budstikken” (La Sendito), eĉ tre fortaj batoj al Helge Sander kaj la estraro de la Dana Agrikultura Lernejo.

Diras bovinbredisto al sia edzino: ”Sed kion li diras pri niaj amataj bovinoj, Panjo?”

”Mi ne scias, sed tio, kion li diras, sonas tre klare” (klere = nekompreneble).

Tio supre citita estas ekzemplo pri tio, kion diros ordinaraj danoj en la tre proksima estonteco, ĉar kiam bestkuracistoj estontece praktikos en okcidentelandaj vilaĝoj, ili bezonos interpretistojn, ĉar ek de nun oni edukos la bestkuracistojn per kaj en la angla. Decidinte tion la estraro de la Reĝa Bestkuracista kaj Agrikultura Lernejo malfermas la vojon al komikaĵoj, kiuj memorigos onin pri ”Erasmus Montanus”, fama teatraĵo de Holberg

”Kompreneble esploristoj bezonos la anglan lingvon, sed tio ne signifas, ke oni ne povas eduki ilin en la dana”, skribas bestkuracisto Søren Nielsen, akuzante parte Helge Sander parte la estraron de la Reĝa Bestkuracista kaj Agrikultura Lernejo pri la problemoj okazantaj se oni ignorante la danan transiros al la angla kiel instrulingvo. Pluraj studentoj timas ke ili subite perdos la parolkapablon. Aliaj timas deprimiĝon dum la specialtasko”. Subkomprenate estas, ke estontece la specialtasko estu verkita en belforma angla – malgraŭ la fakto, ke la plej multaj finstudintaj bestkuracistoj praktikos en Danujo en la

dana lingvo, kompreneble. Juĝante laŭ la anglalingvaj prelegoj, kiujn Søren Nielsen mem antaŭ nelonge aŭdis en la Reĝa Bestkuracista kaj Agrikultura Lernejo, ankaŭ la faka nivelo certe ne altiĝos. Pravas esploradoj, ke la lernado malpliĝos je 40%-oj kiam oni instruas en fremda lingvo. Tio efektive signifas, ke la plej multaj el la studentoj ne scios pri kio temas la prelego de la instruanto kaj tial ili miskomprenos preskaŭ ĉion, kion oni provos instrui al ili.

Samtempe kun sia tro malalta taksado de “la angla malsano” Helge Sander bazas sian vizion por la dana esplorado sur peradministrada pensado, kiu sin vivtenas per modaj frazoj, eble ŝtelitaj for de manpilkludtrejnisto Ulrik Wilbeck: “Ni estos la plej bonaj en la mondo”. En sia artikolo “Kiom kostas gepatra lingvo?” Bent Pedersbæk Hansen, prezidanto de Modersmål-Selskabet (societo por la gepatra lingvo), montras kiom la sport- kaj peradministrada pensado, kiu hodiaŭ gvidas danajn universitatojn, loĝas en la lingvo. Ironie estas, skribas Pedersbæk Hansen, ke la sandera universitato malgraŭ sia manpilkluda gvidfilozofio jam tro longe subfosas ĉiun revon pri danaj esploristoj kiel mondĉampionoj. Niels Bohr estus maldungita se li laborus en universitato hodiaŭ. Nia granda fizikisto ne adaptus sin al la burokrata ŝlimejo de mezuroj kaj regado, kiu jam forigis la liberecon de instruistoj for de la pli altaj instruejoj. ”Fido estas bona, sed regado estas pli bona”, opiniis Lenin, kaj multo indikas, ke Helge Sander konsentas.

El "Budstikken"

”La malsanulo akcidente batis al si la maldekstran grandan piedfingron, kiu nun estas preskaŭ nefiksita. Ne estas permesite al la flegistinaro eltiri ĝin, ĉar tio doloras.”

Pri niaj poŝtkartoj

En la Esperanto-elsendo de la radio 3zzz la 30an de aprilo aŭdeblis rakonto de Katja pri nia nova poŝtkarto – pri ĝia estiĝo, pri la serĉado de fotoj, pri la decidoj rilate la uzotan paperon ks. La aŭskultantoj ricevis ankaŭ la nomon de Audrey, al kiu oni sendu siajn mendojn. Ĝis nun nia

reklamo pri la poŝtkarto en ESK ne aperis, ni do ĝojas, ke la publiko estis informita almenaŭ pere de radio.

K.S.

El medicina ĵurnalo: "Tiuj estas la malsanuloj, kiuj restis kuŝantaj sur mia skribotablo."

Malplialtiĝis la hotelprezoj en Bjalistoko

Mi ĝojas informi, ke UEA atingis malaltigon de la prezoj de hoteloj kaj ekskursoj por la UK en Bjalistoko. La mendoperiodo estas plilongigita ĝis la 13a de majo. Se vi jam mendis kaj pagis, la prezdiferenco estos redonita al via UEA-konto. Vi povos preni ĝin ĉe la UEA-kaso dum la UK aŭ lasi ĝin en via konto por estonta uzo.

Laŭ la nova prezolisto, ekzemple la kosto de unulita ĉambro en hotelo Gołębiewski estas malaltigita de 123 eŭroj al 96 eŭroj, kaj la prezo de la duontaga ekskurso D4 de 40 al 34 eŭroj. Oni povas supozi, ke la prezomalaltigo rilatas al la falinta kurzo de la pola valuto, sed klarigo mankas en la mesaĝo dissendita de UEA.

Laŭ informoj ricevitaj de *Libera Folio*, UEA jam pasintjare faris kontrakton pri la loĝigo dum la UK kun la pola turisma firmao Junio s.c. Biuro Podróży. En la diskutejo de la komitato de UEA oni vaste kritikis la prezojn de la loĝigo, kiuj estas klare pli altaj ol tiuj proponataj de la koncernaj hoteloj kaj gastejoj je senpera rezervo. Dum la kongresa semajno senpera rezervo ne eblos, ĉar praktike ĉiuj loĝejoj jam estas rezervitaj de la agentejo.

Laŭ klarigo de la prezidanto de UEA, Probal Dasgupta, la altaj prezoj grandparte dependis de la fakto, ke la interkonsento estis fiksita en eŭroj, sed poste la valoro de la pola valuto falis pro la ekonomia krizo. Povas esti, ke UEA nun sukcesis atingi novan interkonsenton pri la prezoj, elirante el la nun validaj lokaj prezlistoj, sed ankoraŭ mankas klarigo pri la subita prezomalaltigo.

Libera Folio

El medicina ĵurnalo: "Manĝaĵon li ricevas de sia filo, kiu estas profunde frostiĝinta."

KIO ESTAS LA GAZETO?

LA GAZETO estas revuo mondkultura, sendependa, esperantisma.

MONDKULTURA signifas ke la revuo publikigas eseojn kaj artikolojn pri gravaj aspektoj de ĉiuj kulturoj naciaj, popolaj, etnaj, tribaj kaj homgrupaj.

SENDEPENDA signifas ke la Redaktantoj publikigas en *LA GAZETO* tekstojn kaj grafikaĵojn nur se ili estas kuntaŭgaj kun la principo de neŭtraleco, tio estas: nur se ili estas forme ĝentilaj kaj enhave stile objektivaj kiel eblas en la homgrupo al kiu apartenas la aŭtoroj.

ESPERANTISMA signifas ke la Redaktantoj konsideras la esperantistaron kiel kulture aŭtonoma homgrupo.

Praktike: *LA GAZETO* estas 32 ĝis 36-paĝa, B5-formata revuo, aperanta ses fojojn jare. La baza abonprezo estas 29 eŭroj, iom pli alta ekster Eŭropo. La revuo estas mendebla ĉe la peranto de *LA GAZETO* (en Aŭstralio: 62 AU-dolaroj ĉe AEA-Libroservo, 143 Lawson Street, Redfern NSW 2016, retadreso libroservo@esperanto.org.au aŭ per ĝiro de 33,5 eŭroj al la UEA-konto ‘Zilah edzi-k’).

LA GAZETO ne estas redaktata por komencantoj, sed multaj bonaj Esperanto-instruistoj ĝin uzadas pro la alta lingva kvalito de la publikigitaj tekstoj. Dum la lasta jaro, oni povis legi en *LA GAZETO* tekstojn de Detlev BLANKE, Ed BORSBOM, Peter BROWNE, Christian DECLERCK, Kris LONG, Trevor STEELE, Nicolino ROSSI, YAMASAKI Seiko, HAGHIEV, Istvan L. TOTH, KURISU Kei, HU Guozhi, David KELSO, Nicolao GUDSKOV, Gerrit BERVELING, Andre CHERPILLOD, Jhak LE PUIL, Eugene de ZILAH, Madeleine de ZILAH... kaj aliaj. Dum la sama periodo estis preparolitaj pli ol 35 libroj eldonitaj en la Esperanta aŭ en aliaj kulturlingvoj. Ĉiu kajero enhavas ŝakproblemon de Algis KASPIRAVICIUS, krucvortenigmon, kaj lingvajn ludojn de Nora CARAGEA.

La legantoj de *LA GAZETO* estas grandparte anoj de OSIEK (Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj) kaj estas en kontakto kun *LA GAZETO* kaj inter si.

LA GAZETO volonte sendas provnumeron al tiu kiu petas kaj donas sian precizan poŝtan adreson.

LA GAZETO, 12 sous la Ville, FR-55210 CREUE
(Francujo) gazeto.@aol.com.
<http://www.lagazeto.com>

El medicina ĵurnalo: "La doloroj en la dorso montriĝas, kiam la malsanulo kuŝas kun ambaŭ kruroj sur la dorso."

Mi ŝatas ludi kun vi ?

Vizito al la Sudaŭstralia Muzeo

Sabaton la 18an de aprilo kvar elstaraj esperantistoj renkontiĝis antaŭ la Muzeo. Unu el (Sandor), alia el unu venis el fora maro – (Helen, mi) kaj la rapide babilanta Sylvie Roques el Francujo. Ni aĉetis biletojn kaj ĉiuj estis pretaj eniri, kiam la gvidantino – mi, Helen, haltigis ilin. Ŝi bonvenigis ilin kaj parolis iomete pri la ekspozicio.



Sudaŭstralia
Hungarujo
Anglujo (Pat),
lando trans la
Kanguruinsulo
lasta – tre

"Ĉi tiu kolekto de fotoj de fotografistoj el ĉie fakte estas la kremo laŭ la eble 100 Espereble vi unue la fotojn, poste mi petos vin elekti VIAN preferatan foton kaj diri al ni la kialon."



ekspozicio estas sovaĝej-en la mondo. Ĝi kremo de la juĝistoj. Troviĝos fotografajoj kun ĝojo rigardos

Tiam ili esperis ke ili rajtas eniri, SED ne. Mi (Helen) havis aliajn petojn al ili.

"Sur tiuj ĉi paperpecoj mi skribis kelkajn frazojn. Vi devos trovi la foton, kiu, laŭ vi, plej bone kongruas kun la frazoj."

Mi donis al ĉiuj ĉeestantoj kvar pecojn da papero kun diversaj frazoj. Ekzemple:

"Mi ŝatas ludi kun vi!"

"Blua, blua, blua kaj malvarma."

"Ĉi tiu gustas bone."

"Ho, vi estas granda, mi petas vin ne forglutu min."

"Atentu, atentu, foriru, mi surteriĝas."

"Ĉi tie estas varme kaj humide."

Finfine mi permesis al la esperantistoj eniri la muzeon. Proksimume duonan horon ili serioze rigardis la fotojn. Ni regroupiĝis kaj ekparolis komparante kaj debatante. Tiam ili montris siajn plej preferatajn fotojn, kaj kion – laŭ ilia opinio plej bone kongruis kun iliaj frazoj.

Interesaĵo: Ekzemple Sandor trovis multajn fotojn, kiuj kongruis kun la frazo: *"Mi ŝatas ludi kun vi"*. Multe da ridado.

Post la vizito al la ekspozicio ni piknikis sur la herbejo ekster la muzeo. Ĉiuj ĝuis la travivaĵon.

Helen

El medicina ĵurnalo: "La oreloj estas nur malfacile videblaj malantaŭ la cerumeno."

La Templo de Bona Volo estas aklamita kiel unu el la sep mirindaĵoj de Braziljo.

De Paulo César Pereira

En Brazilo la organizaĵo Legio de Bona Volo jam uzadas kaj apogadas Esperanton de antaŭ 60 jaroj. Ĉe la multaj lernejoj de LBV oni instruas la internacian lingvon.

LBV estas la organizaĵo siaspeca kaj reprezentas la Ekonomia Konsilio Nacioj, angle:



plej granda en Latinameriko, kontinenton ĉe la de Unuiĝintaj Ecosoc.

La prezidanto de la Legio de Bona Volo estas s-ro José de Paiva Netto, kaj verkisto, kiu Esperanto-Brazilo.



La

fama ĵurnalisto tre subtenas la movadon en

organizaĵo, kiu

havas filiojn en multaj landoj krom Brazilo, prizorgas, ĉe siaj lernejoj, malriĉajn infanojn sed faras ankaŭ socialan agadon helpante malriĉajn familiojn. LBV havas filiojn en Portugalujo, Argentino, Paragvajo, Bolivio k.a.

En la kampo de komunikado la organizaĵo dissendas pacan kaj fratecan mesaĝon pere de radia kaj televida retoj. Ĝia mesaĝo koncernas esperon, pacon kaj komprenon inter ĉiuj civitanoj de la mondo, sendepende de ia religia kredo, ĉar ĝia religia agado estas tute ekumena, respektanta ĉiujn religiojn.

LBV konstruadis ankaŭ en la urbo Braziljo, la ĉefurbo de Brazilo, la Templon de Bona Volo, granda kaj bela, piramidforma konstruaĵo, kiu de antaŭ 20 jaroj estas la plej vizitata monumento de la ĉefurbo de la lando, la oficialaj esploradoj de la sekretarioj por turisma fako de la registaro en Braziljo. Al la Templo de Bona Volo iras ĉiutage miloj da homoj por preĝi kaj meditadi en tre paca kaj agrabla etoso. Ankaŭ tie oni parolas la lingvon de Espero, Esperanton !

Por pli da informoj pri LBV bonvolu viziti la paĝaron: www.bonavolo.com.

El medicina ĵurnalo: “La malsanulino estas graveda en la 19a monato.”

Amuzo kaj Scienco

ILEI-konferenco estas ne nur kunveno de kolegoj kaj interesitoj pri disvastigo de nia kara lingvo, sed ankaŭ taŭga spaco por kunlaboro, novaj projektoj, komunaj agoj, interŝanĝo de spertoj k.s. Jam kutima simpozio proponatas por tiuspeca renkontiĝo, kiu povas iĝi forumo de ĉiuj fakaj kaj sciencaj asocioj.

Kial? Ĉar: La laboro de ILEI indikas multe da komuna enhavo kaj samcela orientiĝo kun aliaj fakaj kaj sciencaj Esperanto-movadaj organizoj – edukadon per kaj al Esperanto, kvankam ILEI koncentras sian atenton al la pedagogiaj aspektoj. Ekzistas proksimaj kaj reciprokaj rilatoj inter ili – la organizoj, kiuj agas en la kampo de scienco kaj edukado. Komune tio signifas pluvivigon de la Esperanto-komunumo kaj ne nur per formado de novaj

esperantistoj. Tio signifas kreadon de fundamentaj ŝtonoj por komuna celo, ke Esperanto agnoskату en akademia medio kaj akademia medio taksu nian lingvon taŭga por scienca komunikado. Laborante kune, ne dise, ni estas pli fortaj kaj havas pli da ebloj por atingi niajn komunajn celojn, eĉ por plifortigi niajn proprajn eblojn.

Konferenco de ILEI – la kleriga kaj eduka instanco de la Esperanto-movado – estas tre taŭga kunveno por diskutoj kaj interŝanĝoj de spertoj. Des pli, ke ĝi okazas ĉiun jaron, kaj jam trapasis limojn de nur eŭropaj renkontiĝoj. Tio donas eblon kunlaborigi pliajn personojn el la tuta mondo. Do indas flegi kunlaboron, kiu donus rezulton gravan al la tuta movado, kaj por la organizoj.

Estas ĉiam bone se oni diskutas kune. Se oni intencas plibonigi la nunan situacion, tiam bezonatas klaraj celoj propraj kaj komunaj: kiamaniere oni povas kunlabori kaj helpi unu la alian. Kompreneble, tio povus prezenti kelkajn avantaĝojn (kaj eble malavantaĝojn), sed oni devus zorge pripensi kaj diskuti la aferon kune kaj komune.

Pli en http://www.ilei.info/konferenco/alvoko_krakovo_8.jpg

El medicina ĵurnalo: “Liaj ekskrementoĵ havas la saman koloron kiel la pordoj de ĉambro 29.”

Ilustrinto de Auld pafmortigita

La 16an de aprilo en la Bolivia urbo Santa Cruz mortis Eduardo Rózsa Flores (1960-2009), ilustrinto de la hungara eldono (1987) de La Infana Raso.

Civitano de Bolivio, Hungarujo kaj Kroatujo, Rózsa Flores akiris ian famon en la 90-aj jaroj kiel estro de internacia brigado militanta flanke de Kroatujo, kaj kiel protagonisto de la portreta filmo 'chico' (2001). Li kaj du kunuloj estis mortigitaj de boliviaj sekurecfortoĵ, kaj suspektataj pri komploto mortigi la prezidiston de Bolivio, Evo Morales.

El Libera Folio

